Universala Esperanto-Asocio

**AKTIVULA MATURIGO**

Estrara Subteamo: MOVADO

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, listoj kaj unuopuloj.  La 10an de decembro, 2014.

Estrara Komuniko 2014-49 sendita en la 10a de decembro.

## Pri AMO kaj pliaj temoj

Jen la PDF-versio de la simpla teksto, kun fotoj kaj bildoj.

### AMO 7  Lomeo, Togolando, 27-29 decembro, 2014.



Atentu! La urbo estas ŝanĝita. La seminario okazos en la ĉefurbo Lomeo, ne malproksime de la pli frue nomita urbo. Gvidantoj estos ses, kaj oni laboros ses horojn tage. Oni havas bonan partoprenliston, sed mankas rimedoj por venigi ĉiujn, eĉ post la kontribuoj de la AMO-kaso kaj la Afrika Fondaĵo. La nova respondeculo pri Afriko en la estraro, s-ro Lee Jungkee, aktive arigis kontribuaĵojn por povi venigi pli da homoj. Pliaj donacoj al la Afrika Fondaĵo tre bonvenas, kun klarigo 'por la AMO-seminario'. La detala programo estas alkroĉita. La foto montras la AM-ejon, kulturdomon CCB.

### AMO 8 Weiβwasser, Germanio, de la 29a de decembro 2014 ĝis la 3a de januaro 2015.

La seminario okazos tra kvar matenoj (la 29an, 30an, 31an kaj la 3an). La ĉeftemo estas 'Esencaj elementoj por sukcesa E-organizo' kaj enhavos la sekvajn ĉefajn fadenojn:

- Grupformadon, Projektmastrumadon  (Veronika Poór)
- Informadon  (Peter Balaž)
- Eksterajn Rilatojn  (Michael Boris Mandirola)
- Financan Mastrumadon  (Nico Huurman)



TEJO prizorgas la programon, kunlabore kun la respondeculo en UEA. La programo estos malfermita al ĉiu aliĝinto al JES, sed la organizantoj tre volonte anticipe scios, kiuj volas partopreni la seminarion, por ke reta antaŭtrejnado kaj informado povu okazi.

Anoncu vin ĉe at@tejo.org.

La urbo troviĝas tre proksime al la pola limo, je ĉ. 30 minutoj de Cottbus kaj 45 minutoj de Görlitz sur trajnlinio OE65. La gastiga junulara aranĝo estas organizata de GEJ kaj PEJ kune. Vidu pliajn informojn kaj aliĝu ĉe <www.jes.pej.pl>

## AMO 9  La SeminaRIO:   24-27 januaro 2015.



Seminariaj sesioj kvar-horaj okazos en Rio de Ĵanejro, en la 24a, 26a kaj 27a de januaro, do estos tritaga seminario ene de 5-taga jubilea nacia kongreso. La seminaria ĉeftemo: 'Kiel iĝi aktivulo' entenas la sekvajn sesiojn:

Anna Lobo de Carvalho:  Hommastrumado

Alvaro Motta:  Kiel rilatigi Eon al la Daŭripovaj Evoluaj Celoj

Rafael Henrique Zerbetto:  Varbado.

## AMO 10 kaj pli

Pri pliaj seminarioj ni raportos novjare. Sufiĉas diri, ke pri la sveda seminario mezmaje mi havas amason da informoj, la ĉeftemo estos informado. La kuba seminario okazos novembre en Havano, kadre de la nacia kongreso. En lastaj tagoj UEA akceptis du pliajn seminariojn por 2015, pri kiuj ni informos poste. Tiuj okazos en Kinŝaso (DR Kongo) en julio, kaj en Nepalo en septembro.

## Kongresa afiŝo

Aperis la afiŝo de la 100a Universala Kongreso de Esperanto; ĝi estas elŝutebla el la kongresa retejo:

http://www.lve-esperanto.org/lille2015/doc/Afisho1.jpg

La afiŝon vi povas laŭplaĉe uzi kaj printi cele al plej vasta informado. Ne hezitu plusendi la mesaĝon al viaj kluboj, asocioj, konatuloj!  La Libroservo de UEA kaj LKK ne intencas fizike presi ĝin pro la alta afranko kaj malfacila pakado. Nuntempe eblas sen alta kosto akiri bonkvalitan presadon en moderaj kvantoj. Do, pendigu ĝin en viaj klubejoj, oficejoj, plie en lernejoj, publikaj lokoj kaj afiŝtabuloj, eventuale kun konvenaj loklingvaj klarigoj. Via loka aŭ landa libroservo eble decidos presi kaj vendi ĝin. Montru ĝin al ĵurnalistoj, kune kun rakonto pri la lokuloj planantaj partopreni en Lillo! Eĉ la apero de afiŝo povas esti novaĵ(et)o!




## Enketilo sekvos

Tra la jarfina periodo, UEA komencos enketi ĉe la Landaj Asocioj pri la agado en 2014, kaj se eble faros similon ĉe la Fakaj Asocioj. La celo estas akiri pli klaran bildon pri la landnivela stato de la komunumo, rimarki sukcesojn por konstrui sur ili kaj malfortajn punktojn por ilin kune kuraci. Do, kiam tiu enketilo trafas la asocian en-keston, bv. nepre stelumi aŭ flagumi ĝin kaj arigu respondojn!

**AMO – NIA PLUVIVIGILO!**

Ne nur amo pluvivigas la homan specion, ĝi estas la vojo pluen por nia movado kaj lingva komunumo, kiu ja devas konscie krei siajn sekvajn generaciojn. Tro gravas la tasko por lasi tion al hazardo aŭ agemaj unuopuloj – UEA havas mision preni la gvidan rolon. Vi povas helpi nin en tio!

Donaco al la asocio kun indiko 'por la AMO-progrAMO' estos uzata ekskluzive por pluvivigi kaj kreskigi la programon!